

STARTO

N-ro 2/2019 (271)

ORGANO DE ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO



Foto L. Kovář

Esperantista renkontiĝo en Česká Třebová

sabate la 1-an de junio 2019

☆ Starto ☆

organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio,
aperas 4-foje jare.

Asocia adreso: Ĉeĥa Esperanto-Asocio, náměstí Míru 81/1, 568 02 Svitavy, **reta poŝto:** cea@esperanto.cz, ces@esperanto.cz.

Retpaĝaro de ĈEA: www.esperanto.cz
redakce@esperanto.cz

Identec-numero (IČ): 00 44 30 34

Starto retpoŝte: starto@esperanto.cz

Komercaj anoncoj: 25 Kč por unu linio, 800 Kč por kvaronpaĝo, 1500 Kč por duonpaĝo, 2500 Kč por tuta paĝo. Duobla reklamo 15% rabato, trifoja reklamo 30% rabato. Movadaj anoncoj duonpreze.

Membrokotizoj: A 350 Kč (Starto elektronike 240 Kč), B 250 Kč (elektronike 140 Kč), C 100 Kč, P 150 Kč, F libervola, enskribo 20 Kč.

Korespondaj kursoj: Cink: 400 Kč / 720 Kč (rete / normale); Marček: 600 / 800 Kč; Cink por progresintoj 600 / 1080 Kč. Aliĝoj: Jana Melichárková, Vacenovice 398, 696 06 Vacenovice, melicharkova8@seznam.cz

Libroservo: Muzeum esperanta, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, tel. 604 377 616, dvor.libuse@seznam.cz, marie.cumova@seznam.cz.

Sekcioj de ĈEA: katolika, kristana, blindula, grupo por ciferecigo (memstariĝis: handikapitoj, junularo, fervojistoj)

Komisionoj de ĈEA: pedagogia

Muzeo: muzeagrupo@esperanto.cz

Kolektado de gazetaj eltranĉaĵoj:

Dagmar Martinková, Chelčického 51, 568 02 Svitavy, martinkova.sy@seznam.cz, — sufiĉas sendi kopion, skanaĵon, ligan al la gazeta retejo

BANKO-KONTO de ĈEA:

2800 186 228/2010

Fio banka Svitavy

Komitato de ĈEA:

Prezidanto: Libuše Hýblová, Bohutín 136, 789 62 Olšany, tel. 774 928 974, libusehyblova@seznam.cz (gyidado, kunordigado kaj reprezentado de ĈEA, eksteraj rilatoj inkl. UEA, EEU)

Vicprezidanto: Leonarda Chaloupková, K Panskému poli 160, 251 01 Světice, tel. 732 415 094, leonarda.ch@seznam.cz (laboro kun kluboj kaj sekcioj, subvencioj)

Kasisto: Vratislav Hirs, Ruprechtov 117, 683 04 Drnovice, tel. 517 444 117, vratislav.hirs@esperanto.cz (membro-datumado, kontado)

Komitatano kaj redaktoro de Starto: Miroslav Malovec, Bosonožská 15/10, 625 00 Brno, tel. 737 562 479, 530 319 263, miroslav.malovec@esperanto.cz (historio de la movado, kulturo, lingvaj konsultoj, ciferecigado, fakaj aplikoj, pedagogio)

Ĉefdelegito de UEA por Ĉeĥio: Petr Chrdle, Anglická 878, 252 29 Dobříchovice, tel. 257 712 201, chrdle@kava-pech.cz

UEA-kotizperanto: Ĉeĥa Esperanto-Asocio. La pagojn sendu al la konto de ĈEA (vidu paĝon "Jak platit svazu"). Admiŝtras: Petr Chrdle (kontaktojn rigardu en la antaŭa alineo).

Esperanto-Muzeo en Svitavy: Ottendorfer-domo, nám. Míru 81/1, 568 02 Svitavy, muzeo@esperanto.cz
www.muzeum.esperanto.cz

Facebook kaj Ipernity

www.facebook.com/Esperanto.cz/

www.ipernity.com/home/esperanto-muzeo-svitavy

www.facebook.com/groups/esperanto.muzeo.svitavy/

www.facebook.com/muzeumesperantasvitavy/

Kontrollegis: la komitato, K. Votoček, V. Türk, P. Polnický, P. Dvořáková

Lanĉo de la libro *L. L. Zamenhof* en la Pola Instituto

Kiel mi jam antaŭanoncis en Starto, mi volonte uzis afablan ofertan de la Pola instituto en Prago organizi lanĉon de la verko „L. L. Zamenhof“ de Aleksander Korĵenkov en traduko de Jindřich Košťálek kiel komunan aranĝon en la salono de la instituto. Ununura malgranda problemo ekaperis dum la serĉo de konvena dato, tial la oficiala lanĉo de la libro okazis kun prokrasto kompare kun la vera ekoferto de la libro en libro-vendejoj, nome la 30an de majo.



Partoprenis ĝin inter 40 kaj 50 ĉeestantoj. Jam antaŭ la komenco fruenintoj interesiĝis pri la ekspoziciataj libroj eldonitaj de la eldonejo KAVA-PECH kaj pluraj uzis la okazon aĉeti iujn kun porokaza rabato.

La ĉefan programon startigis la direktoro de la Pola instituto Maciej Ruczaj, kiu en perfekta ĉeĥa lingvo bonvenigis la partoprenantojn, iom prezentis la instituton kaj transdonis la vorton al mi.

Mi en la formo de prezentado iom enkondukis ne nur la lanĉitan verkon, sed ankaŭ la ceterajn ĉi-jarajn novaĵojn, nome en Esperanto *Lorenaj fabeloj en la loren-germana kaj en Esperanto* tradu-

kitan de la persone ĉeestanta Benoît Philippe, kiun mi ankaŭ prezentis, kaj *La gregoria kalendaro reformo kaj ĝiaj postefikoj* de Reinhard Fössmeier kaj Michael Maitzen, kaj en la ĉeĥa la verkon de Vlastimil Novobilský pri heroo vivo de sia patro *Jaroslav Novobilský – Muž, který povýšil morální principy nad strach ze smrti* (La viro, kiu rangigis moralajn principojn super timon el morto).

Siajn impresojn de la tradukado de Zamenhof komunikis J. Košťálek, sed ankaŭ prezentiĝis Ruth Jochanan Weinger, kiu, kvankam neesperantisto, post la tralego de la libro en la angla traduko konvinkis min, ke ĝi estus tre valora ankaŭ por la ĉeĥa publiko kaj se ĝin ne eldonos mi, do verŝajne ĝi en la ĉeĥa ne ekzistos. Kaj ŝi ankaŭ el la pozicio de profesia religionisto fariĝis faka konsultanto de Jindřich dum la tradukado.



La ĉefa progamero estis kompreneble la propra lanĉo, por kiu ni havis du sortoaŭgurantojn. Ĉar la verkaro de L. L. Zamenhof havas du trajtojn, la lingvistikan, projekton de la internacia lingvo, kaj la spiritualan, projekton de homaranismo, la lingvistikan flankon reprezen-

tis la prezidanto de la praga Esperanto-klubo Tomáš Břicháček kaj la spiritalan flankon la renoma religionisto Ivan Štampach, kiu tuj la sekvan tagon aperigis en *Náboženský infoservis* (Religia informilo) ampleksan recenzon de la libro *Publikace k výročí protagonisty spirituálního humanismu* (Publicaĵo al datrevenoj de la protagonisto de sprituala humanismo).



Al la agrabla etoso kontribuis Pavla Dvořáková, kiu kelkfoje intervenis ludante gitaron kaj kantante en la jida, pola kaj Esperanto. Ĉe la lasta kanto, *Ludoviko* verkita de Georgo Handzlik, kun la projekciata teksto, ŝi eĉ sukcesis kantigi la publikon.

La lasta, tre agrabla parto de la aranĝo estis la neformalaj babiladoj dum la tosto kaj bankedeto ofertita de la instituto. Pri ĉio flanke de la Pola instituto zorgis Lucie Zakopalová, al kiu mi volas ankaŭ publike danki. Mi kredas, ke tio estis la unua, sed ne la lasta kunlaboro de la instituto kun ĉeĥaj esperantistoj, simile, kiel tio funkcias jam multajn jarojn en Vieno kaj Bratislavo.

Petro Chrdle,
chrdle@kava-pech.cz
fotis Luděk Neužil

La libro ne manku en via libraro!

KLUBA KRONIKO PRAGO

Kadre de la regulaj kunvenoj, okazantaj ĉiun duan ĵaŭdon ekde la 17-a horo en la klubejo Ve Smečkách 26 apud la Venceslaa placo, realiĝis pluraj specialaj prelegoj.

Aparte menciindas projekciado kun informriĉa prelego pri aktivecoj de la [Esperantomuzeo en Vieno](#), kiun la 21-an de marto prezentis Bernhard Tuidler, teamestro de la institucio (*surfote dekstre*).



18. 4. prelegis M. Turková "Kiel [Kurisu Kei](#) tradukadis la verkaron de J. Hašek", 2. 5. P. Chrdle pri la familo [Ginz](#) kaj 16. 5. J. Galuška pri vojaĝo al Jukatano en Meksikio.

Aktualaj informoj pri la agado kaj diverstemaj artikoloj troveblas en la interrete senpage havebla [Praga Bulteno](#).



Vizitantoj ĉiam bonvenas!
-pd-

ĈeFEA r.s festis 10-jariĝon

Sabate la 1-an de junio 2019 okazis en Česká Třebová renkontiĝo kun celo rememorigi 10-jaran datrevenon de fondigo de la Ĉeĥa Fervojista Esperanta Asocio r.s. Antaŭtagmeze kuniĝis apud stacidomo 24 gepartoprenantoj, inter ili gastoj el Aŭstrio kaj Ĉeĥa Esperanta Asocio.



Foto: Gepartoprenantoj ĉe memorŝtono

De la stacidomo ni, post mallonga promeno, vizitis firmaon CZ LOKO, kiu nunjare festas 170 - jaran datrevenon de sia seninterrompa funkciado, kaj pro tio estis aranĝita tago de „malfermitaj por-doj“ kun abunda programo. Partoprenantoj de la renkontiĝo trarigardis laborejojn kaj halojn kun prezentaĵoj de iliaj produktoj – lokomotivoj, motorveturiloj kaj aliaj, kiujn ili liveras al enlandaj kaj eksterlandaj klientoj.

Ni estis agrable surprizitaj per alta nivelo de laborejoj kaj instalaĵoj. Poste sekvis komuna fotografado ĉe memorŝtono de E-Klubo Česká Třebová en parko Javorka. Post refreŝiĝo en restoracio Javorka ni rememorigis 10-

jaran funkciadon de ĈeFEA - kia estis motivo de ĝia fondigo kaj kion oni sukcesis fari dum pasintaj jaroj. Konkize ni konatigis kun historio de CZ LOKO kaj iama fervoja riparejo.



Trarigardo de CZ LOKO

Je la fino de la renkontiĝo ni rigardis fotografajoj el la 71-a IFEF kongreso en Malaga, kiu okazis komence de monato majo samtempe kun kongresoj de Hispana kaj Andaluza E- organizaĵoj.

*Ladislav Kovář
teksto kaj fotoj*



*Ladislav Kovář en Malaga
fotis Liba Gabalda*

La 71-a INTERNACIA FERVOJISTA ESPERANTO-KONGRESO

3. - 9. majo 2019

En Andaluzio en la urbo Malago situanta ĉe la Marbordo de la Suno okazis ĉe tri kongres-aranĝoj komence de majo. La 78-a Hispana Kongreso, la 21-a Andaluzia Kongreso kaj la 71-a IFEF-Kongreso. La eventojn partoprenis ĉirkaŭ 180 geesperantistoj el 22 landoj. La plej foraj partoprenantoj venis el Brazilo, Ĉinio, Japanio, Koreio, Meksiko. Regis tre agrabla internacia etoso.



La unua IFEF-kongreso en Hispanio okazis en Barcelono en la jaro 1909. La ĉefa kialo elekti Hispanion kiel kongreslandon estis deziro festi tie la 110-an jubileon. Al tio forte strebis la prezidantino de IFEF Rodica Todor. Ŝi sukcesis konvinki esperantistojn en Malago, ke ili organizu la kongreson en sia lando. La elekto estis bona; agrabla ĉemara urbo, bela suna vetero, konvena kongresejo en Dioceza Domo, kie ĉio okazis sub sama tegmento.

La programo estis varia kaj riĉa je diversaj prelegoj, atelieroj, ekskursoj kaj artaj vesperaj programoj. La inaŭguro okazis en granda salono kun partopreno de la reprezentantoj de ĉiuj asocioj. HEF (Hispana Esperanto-Federacio) estis reprezentata de Tonyo del Barrio, AEU (Andaluzia Esperanto-Unuiĝo) de Ángel

Arguillos kaj IFEF de Rodica Todor. Ĉeestis ankaŭ reprezentanto de UEA kaj la urba skabenino pri kulturo. Post bonvenigaj vortoj kaj salutoj de reprezentantoj de la partoprenantaj landoj, la kongreso estis malfermita. Poste okazis komuna fotado.

Inter la partoprenantoj ĉeestis eminentaj personoj: Margareta Zaleski-Zamenhof, pranepino de L. L. Zamenhof, Seán Ó Riain, irlanda diplomato en Vieno, Katalin Kováts, fakulino pri lingvistiko kaj Esperanto-instruado, Federico Gobbo, doktoro pri informadiko kaj komunikado kaj du estraranoj de UEA - por nomi nur kelkajn.

Okazis ĝeneralaj, fakaj, komitataj kaj estrar-kunsidoj, estis priparolataj movadaj aferoj kaj strategio pri la estonteco de IFEF. Estis elektita nova estraro por tri-jara periodo. Interesis nin prelegoj rilataj al fervojo: "La AVE (hispana grandrapida trajno) al Mekko", "Hyperloop" (morgaŭa fervojo), "Veturado tra la interplaneda spaco", "110-a jariĝo de la internacia fervojista movado". Surpriza estis sciigo pri projekto de Esperanto-stacio en forlasita stacidomo *Halbe* ĉe Berlino. Estis prezentataj venontjaraj kongres-lokoj. IFEF kongresos en Germanio en *Frankfurt an der Oder* kaj en pola urbo *Slubice* situanta trans ponto ĉe la germana limo. Samtempe okazos la germana kaj la pola kongresoj.

Interesaj estis debatoj kaj prelegoj pri diversaj temoj, inter kiuj: "La angla lingvo en la Eŭropa Unio post la Briteliro", "Projekto Erasmus", "Kiujn fremdlingvojn oni instruas en EU?", "La homo sur la Luno", "Ĉu EU vere havas 24 ofici-

alajn lingvojn?", "Enkonduki Esperanton kiel oficialan lingvon ĉe EU". Esperantan Katedron en la Amsterdama Universitato prezentis Federico Gobbo, pri la projekto "Esperanto plaĝo" en hispana ĉemara urbo *Cullera* parolis Dennis Keefe.



Krome okazis ateliero pri informadiko, pri arĥivado kaj pri mikro-rakontoj. Eblis partopreni Esperanto-kursojn kaj KER-ekzamenojn. Pri la libroservo zorgis Mariló Torres kaj Conchi Fernández. Pri aŭkcio okupiĝis Tonyo del Barrio, Katalin Kováts kaj Margareta Zaleski-Zamenhof. Vendiĝis ĉiuj proponataj objektoj por la profito de la kongreso. En la loka ĵurnalo "La Opinión de Málaga" aperis ampleksa artikolo kun fotoj pri la kongreso kaj pri Esperanto.

Tuttagaj ekskursoj gvidis nin al urboj Rondo, Granado, Kordovo kaj *Madinat al-Zahra*. Duontaga ekskurso celis la urbon *Antequera*. Plaĉa estis faka ekskurso al fervojlinio en *Zafarraya*, kie ni ĝuis veturon en trajneto tirata per eta vaporlokomotivo. Ne mankis urbovizitado de Malago kaj de ĝia bela botanika ĝardeno.

Dum la semajno okazis abunda, tre

varia kaj altkvalita muzika kaj arta programo. Vesperan programeron "Vivu la teatro" reĝisoris Miguel Fernández kaj Ana Manero. Andaluzian muzikon ni ĝuis kun Rocío Alba, Pedro Carrillo kaj Concerto Málaga. Per Esperanto-muziko kaj kanzonoj regalis nin Grazia Barboni, Kajto kaj per ciganaj kantoj Saša Pilipović. Li ankaŭ impone kaj profesie prezentis monodramon pri Galileo. Ĉe la fermo estis transdonita la IFEF-flago al la reprezentantoj de Germanio, kie okazos la transpona Esperanto-kongreso: germana, pola kaj fervojista de la 29-a de majo ĝis la 5-a de junio 2020. Vi estas invititaj partopreni ĝin.



En ĉi-kongreso ni ĝuis emociplenajn momentojn, internacian kaj amikeman etoson. Koran dankon al niaj andaluziaj samideanoj kaj al iliaj kunhelpantoj pro agrabla semajno en Malago!

Ege interesa estis la tritaga postkongresa ekskurso al norda Maroko, kiun ĝuis kvardek tri gesamideanoj. Ni traveturis la urbon Ceuta kaj vizitis la urbojn Tetouan, Asilah, Tanger kaj Chaouen.

*Liba Gabalda
teksto kaj fotoj*

Ankoraŭ pri Kei Kurisu

En la unua ĉijara numero de Starto belege rememoris P. Chrdle esperantiston, tradukiston kaj varmegan amikon de nia lando, japanon Kei Kurisu. Tamen mi kuraĝas aldoni kelkajn personajn memorojn, ĉar tiuj kompletigos la portreton de K. Kurisu, kiu laŭ mi estas tute nesufiĉe honorigita flanke de reprezentantoj de nia ŝtato kaj de oficialaj kulturaj institucioj. Krome, li havis vastajn kontaktojn kun multaj personoj – ne nur esperantistoj – el nia lando kaj ne tro multaj el ili ankoraŭ vivas.

Nia unua renkontiĝo okazis en tempo, kiam K. Kurisu instruis la japanan lingvon en la Karola Universitato. Li ofte vojaĝis tra nia lando cele kontakti esperantistojn kaj konatiĝi kun la ĉeĥaj realaĵoj. Kompreneble ankaŭ Ostrava ne mankis inter liaj celoj kaj ĉe tiu okazo ni gastigis lin en nia hejmo. Ni tiam loĝis en tre malabunda loĝejo en minista kvartalo (en la ĉeĥa „hornická kolonie“). Sian impreson li enskribis en nian vizitlibron jene:

Pro hazardo mi havis feliĉan okazon vespermanĝi ĉe la gepatra hejmo de fervoraj esperantistoj fratoj Kočvara. Tio estis por la unuafoje, ke mi vizitas hejmon de ĉeĥa ministro. Mi longe memoros tion. Vespere la 28-an de oktobro 1960. Kei Kurisu el Tokio.

La gasto miregis, ke ministro, kiun tiama politika sistemo deklaris heroo de laboro vivas en tiel mizera loĝejo.

La sekvan tagon mi akompanis lin al Opava, ni vizitis Memordomon de P. Bezruč (Památník P. Bezruče), li traktis tie kun ĝia direktoro kaj promesis traduki el la verko de Bezruč. Tio plenu-

miĝis nur parte, li japanigis – laŭ mia scio - nur la poemojn *Ostrava* kaj *Mi*.

Poste ni interkorespondadis, komence nur sporade, pli poste tre intense. Tamen la fasko de tiu skriba kontakto estas en mia persona arkivo la plej ampleksa. Lige kun sia la plej grava traduka verkaĵo – *Riporto* de J. Fučík – li kolektis ĉiujn eldonojn de tiu ĉi libro, ĉar li detale pristudis diversajn ŝanĝojn en la teksto de ĝi, kiuj havis politikan fonon. Siajn malkovrojn li kelkfoje publikigis, kiel li mencias en sia verketo eldonita de KAVA-PECH. Li probable havis la plej kompletan kolektaĵon de tiu libro ekster nia lando, mi scias pri minimume kvardek eldonoj. Mi mem sendis al li vicon da diversaj eldonoj, kiujn mi serĉis en librobrokantejoj. La lasta sendita eldono estis tiu luksa eldonita en la jaro 2007 de la Otto-eldonejo, la plej ampleksa el ĉiuj eldonoj (504 paĝoj, prezo pli ol 500 Kč).

K. Kurisu estis dum la tuta vivo „maldekstrulo“, kvankam li post diversaj personaj spertoj el la organizita movado eksiĝis. Tamen lin daŭre interesis politika evoluo en nia lando, li ĉerpis informojn el la komunista taggazeto „Rudé právo“, kiun mi kelkjare por li abonis. Sekve li diskuteme korespondis kun iuj komunistaj funkciuloj, inter tiuj plej ofte kun Zd. Hoření, la ĉefredaktoro de la gazeto. Malgraŭ sia scio de la ĉeĥa, li principe al adresitoj skribis nur Esperante kaj la leterojn sendis pere de mi, ĉar mi funkciis kiel interpretisto. Mi scias, ke la adresitoj respondadis al K. Kurisu ĉeĥe sen mia partopreno, do, pri ties diversaj starpunktoj mi nenion scias, tamen certe estus interese legi ilin.

La plej viglaj kontaktoj inter ni komen-
ciĝis post decidiĝo de Kurisu, ke li
tradukos la verkon de J. Hašek *Dějiny
strany mírného pokroku v mezích
zákona*. Tio okazis en la jaro 2002. Mi
kompreneble la libron konis kaj mi
avertis lin, ke ĝi estas malfacila por
fremdlingven traduki, ĉar ĝi enhavas
multegajn aktualajn aludojn el tempo,
kiam J. Hašek la libron verkis.

Tio vere montriĝis ankaŭ en kvanto de
nia tiutema korespodado. En la sekva
jaro mi ricevis 32 leterojn, ofte mult-
paĝajn, en kiuj li petis pri helpo por
kompreni la situacion. Temis pri faktoj
ne troveblaj en kutimaj vortaroj kaj enci-
klopedioj. Plej ofte li bezonis scii nomi-
nativon de personaj nomoj cititaj en la
libro, li ne komprenis diversajn idiom-
aĵojn kaj popolturnoj. Mi mem ofte devis
serĉi diversajn fontojn por kapabli la
demandojn de Kurisu klarigi.

Por iom ilustrati tiun problemon mi citu,
ekzemple: *snědla tři indiány, hladové
kameny ve Vltavě, vypil věneček piv,
holubičí národ, špičkovat, Malvazinka,
oficiál*, ktp. Nia kunlaboro daŭris kelkajn
jarojn kaj la laboro super japanigo de la
libro relative rapide progresis, tamen la
malsano estis pli rapida. Venis san-
problemoj, la traduklaboro komenciĝis
lami kaj fine ĝi ĉesis. La lasta letero de
mia amiko, en kiu li dankas por la nova
supre menciita impona eldono de
„*Riporto*“ kaj enhavas malnovan leteron
de G. Fučíková adresita al Kurisu por ke
mi transdonu ĝin al Z. Hoření estis
datumita la 15-an de majo 2008.

Poste venadis nur informoj pri lia
malboniĝanta sanstato. Do, la libro *His-
torio de la partio de modera progreso en
la limoj de leĝaro* restis nefintradukita.
Pri sorto de la manuskripta tradukaĵo mi


scias nenion plu.

La grandegan kontribuon, kiun K.
Kurusu faris por konatigi la ĉeĥan lite-
raturon en Japanio aprezis nur kelkaj so-
cietoj, neniel honorigis lin oficialaj ŝtataj
instancoj, kvankam mi ripete sendis
proponojn al ministerio de kulturo.
Bedaŭrinde.

Vlastimil Kočvara

Rimarko de la redaktoro:

Ankaŭ kun mi s-ro Kurisu korespondis
pri la libro de Hašek kaj aliaj aferoj. Jen
ekzemplo de unu el liaj leteroj:



Lingva seminario en Ĉeĥa paradizo

Entute 20 geamikoj venis profiti kaj ĝoji pri Esperanto en pensiono Espero de 9-a ĝis 12-a majo 2019.



Prelegon pri Avulino el Skokovy laŭ mane skribitaj memoraĵoj el la jaro 1944 fare de sinjoro Mandík preparis Jindra Drahotová. Rakonto pri Japanio kaj poemoj pri ĝi de Ĉestmír Vidman sprite prezentis Margit Turková.



Ni kantis kun CD de Noproblem danke al Líba Dvořáková kaj popolajn kantojn kun pianludo kun Leonka Chaloupková. Pavel Brom prezentis sian filmon pri 88-a Universala Kongreso en Gotenburgo kaj Jindra siajn fotojn el Portugalio.

La tempo ne sufiĉis por realigo de ĉiuj programeroj. Dum renkontiĝo je la unua vespero ĉiu havis ion por rakonti pri sia agado kaj vivo.



Okazis prelego pri afrika lando Namibio, kiun vizitis Mirka Ascherová.



La vetero eĉ permesis ekskursi post-tagmeze en naturon. Pri la konstanta gaja etoso zorgis Pavel Polnický.



Aĉeteblaj estis la lasta nova „Legaĵoj VI.“ kaj „Vyprávěny“ - la dua volumo laŭ „La Mondo Rakontas“ de Teodor Kilian spegule ĉeĥe-esperante kaj libro de Kalle Kniivila en ĉeĥa traduko „Potomci imperia – Rusové na Baltu“, ĉiuj presitaj en aprilo 2019.



Jindra Drahotová

Novaj libroj

En aprilo 2019 eldonis Jindřiška Drahotová aĉeteblajn libretojn:

LEGAĴOJ VI. – buntaj artikoloj pri interesaĵoj: ekzemple "Interhelpo", "Ankaŭ Zamenhof estis komencanto" – de Renato Corsetti, artikolo de Věra Podhradská, ktp. – 50 Kč.

VYPRÁVĚNKY – dua volumo laŭ La Mondo Rakontas de Teodor Kilian, spegule ĉeĥe-esperante – 100 Kč

POTOMCI IMPÉRIA – rusové na Baltu od finského novináře Kalle Kniivilä, rozhovory s obyvateli tří republik z roku 2017, jazykové problémy – 70 Kč.

Poštovné 30 Kč.

drahotovaesperanto@seznam.cz

telefon 720 652 320



Skokovy per okuloj de partopreninto

Komence de ĉi jara majo denove okazis jam la 49-a lingva E seminario en Skokovy.

Kunvenis ĉirkaŭ 20 personoj. La nombro „ĉirkaŭ“ eksplikas tion, ke iuj ĉeestantoj ne restis la tutajn 4 tagojn – ili venis nur por unu tago, aŭ por parto de tago.

Ĉiutage matene okazis milda, agrabla gimnastiko sub gvido de Jindřiška – saluto al suno kaj ekzerceroj por vekigo, fortigo kaj pozitivigo de la korpo.

Post matenmanĝo komencis la lingva seminario. Estis du grupoj – komencantoj kaj progresintoj. Ambaŭ lektorinoj, Jindřiška kaj Libuška, lerte gvidis la kursanojn.

Tre plaĉis al mi (progresinto) serĉado de vortoj komencantaj per litero B sur bildo de eble kampara somerumo kaj ankaŭ interesa estis esperanto-lingvaj ludkartoj „kvarteto“.



Pavel preparis tre belaspektan kaj interesan ludon – ekkonon de urboj mondaj kaj ĉeĥaj kaj bildkartojn de pentraĵoj de ĉeĥaj artistoj. De sur la bildkartoj oni konstatis, pri kiu urbo, desegnaĵo temas, kaj skribis tion sur paperon. Vespere Pavel publikigis la

rezulton – la tri unuaj gajnintoj, kiuj ekkonis plej multon de la bildoj, estis ni tri, anoj de E-klubo en Benešov. Ni ricevis malgrandan donaceton, kaj ni ĝojis pro ĝi kaj ankaŭ pro nia „venko“.

Mirka Ascherová interese prelegis pri sia vizito de afrika Namibio.

Posttagmeze okazadis turista ekskurso al ĉarma ĉirkaŭaĵo de Skokovy – belega pejzaĝo, profunda arbaro, grimrado supren kaj malsupren sur romantikajn rokojn de Ĉeĥa Paradizo. Kvankam la duan tagon pluvis, la kuraĝaj turistoj denove faris – jam ne tiel longan – promenon tra la ĉirkaŭaĵo.

La ceteraj ĉeestantoj restis en la penziono kaj dediĉis sin al artaj manlaboroj, gvidataj de Eva. De koloraj paperoj oni eltondis aŭ faldis ĉarmajn florojn, papiliojn, birdetojn kaj aliajn belaĵojn.

Kiu deziris nek turisti, nek arte formi, povis normale babili kun la aliaj ĉeestantoj en hejmeca halo. Interesa, multtema interparolo!

Vespera programo enhavis unuatage personan prezenton de la partoprenantoj, en ceteraj vesperoj oni aŭdis prezenton de poeto Ĉestmír Vidman de Margit, vojaĝtravivaĵojn de Pavel, okazis eĉ kantado.

Dimanĉe, post matenmanĝo, finis la bela, amika restado.

Koran dankon al Jindřiška Drahotová, Liba Filipová, Margit Turková, Eva Pánková kaj ankaŭ al familio Hradil, kies anoj tre bone kuiris kaj zorgis pri nia senproblema restado. Ĝis revido, Skokovy!



LChal

Tra la mondo

■ Klarigo, kiamaniere la kroataj esperantistoj atingis, ke Esperanton ilia kulturministerio akceptis kiel **nematerian kulturan heredaĵon**, oni trovas ĉi tie:

www.esperanto.hr/kroatio_esperanto_heredajxo_espe.pdf

Pri nacilingvaj tradukoj el la kroata literaturo zorgas la koncernaj nacioj, sed pri la esperantaj devas zorgi kroatoj mem. Tial ili petis ministerian subtenon, por ke la farita laboro ne perdiĝu, sed disvolviĝu.

■ **Homo nevidebla** estas verko de la hungara klasikulo Géza Gárdonyi. La esperanta traduko en la formatoj HTML, Word, RTF, PDF, PRC, DjVu estas senpage elŝutebla ĉi tie:

<http://mek.oszk.hu/19300/19359>

La tradukintoj petas legantojn atentigi pri eventualaj mistajpoj aŭ aliaj mankoj.

■ La himno "**La Espero**" estis freŝdate surbendigita fare de la Sankt-Peterburga Guberniestra Simfonia Orkestro gvidata de Igor Ponomarenko. Tiu profesie surbendigita versio estos ludita dum la inaŭgura kaj ferma ceremonioj de la Universalaj Kongresoj, organizataj de la Universala Esperanto-Asocio.

■ Nova servo de UEA **Eventa** ebligas enmeti preparatan eventon kaj tiamaniere ĝin diskonigi tutmonde ĉe <https://eventaservo.org/> La retejon kreis la brazilano Fernando Ŝajani, kun moderna plurrimeda sistemo por listigi Esperanto-eventojn tutmonde.

■ Esperantista Sicilio preparas retejon, kiu estos **elmontro por niaj libroj** en Esperanto. Sufiĉas sendi bonfaritajn

fotojn de ĉiu kovrilo, la enmeto estas tute senpaga. Bonvolu sendi ilin jpg-forme al: associazione@siciliaesperantista.com Vi rajtas proponi ankaŭ librojn en via loka lingvo.

■ **Esperantistoj en Bjelovar** (Kroatio) festos 110-jariĝon de Esperanto en ilia urbo per 7-a esperantista renkontiĝo la 20-an kaj 22-an de septembro 2019. En la programo estas interkona vespero, deklamkonkurso, solena kunveno kun disdono de premioj al merituloj, starigo de memortabulo al Vilim Polašek, vizito al Đurđevac, trarigardo de la fortikaĵo Stari grad, inaŭguro de la sidejo de Dokumenta Esperanto-Centro kun starigo de memortabulo al la sponsoroj.

Kontaktoj: esperanto.bjelovar@gmail.com

www.esperanto-bjelovar.hr

■ **20-a Israela Kongreso de Esperanto** okazis en Eilat (11.-14.4.2019) ĉe Ruĝa maro. En la programo estis prelegoj kaj ekskursoj al historiaj lokoj (Morta maro, Masada, Jeriko, Jerusalemo, Tel-Avivo aŭ Haida, Bahaa Centro, Nazareto, Lago de Galileo, Akko). Partoprenis pli ol 50 esperantistoj el 11 landoj. Samtempe okazis kunveno de MONA (komisiono de Meza kaj Norda Afriko de UEA).

■ **Lernu Esperanton kun Superhundo** estas titolo de reta kurso, kiun preparis Didi Weidmann en sia blogo

<http://informejo.com/lernu-esperanton-kun-superhundo.html>

La kurso kun vivanta hundo (labradora tipo, kian uzas blinduloj) konsistas el 26 lecionoj.

Usonaj lingvistoj vizitis Esperanto-muzeon



Sabate la 4-an de majo 2019 vizitis nin geedzoj D-ino Melissa L. Curtin kaj Prof. Michael Curtin. Ambaŭ laboras ĉe Kalifornia Universitato en Santa Barbara.



Profesor Michael Curtin dediĉas sin al fako de filmaj kaj amaskomunikilaj studoj. Doktorino Melissa L. Curtin specialiĝas pri interkultura komunikado kaj lingvistika antropologio. Ili jam vizitis multajn lingvomuzeojn tra la tuta mondo, ekz-e en Tchaj-wan, en Parizo aŭ en Brazilo. Antaŭ Esperanto-Muzeo en Svitavy ili vizitis ankaŭ Esperantomuzeon en Vieno, kien intencas iri la klubanoj de Svitavy dum ferioj. Ili interesiĝis pri kondiĉoj de studado de fremdaj lingvoj en ĉeĥaj lernejoj en la tempoj pasintaj kaj nuntempe.

Plej multe ili interesiĝis, kial ni lernas Esperanton, kiamaniere ni iĝis esperantistoj kaj ĉu

niaj kondiĉoj estas nun pli bonaj ol antaŭe. Ilian atenton kaptis la riĉa agado de la loka esperantista klubo, dokumentita en fotolibroj kaj kronikoj, kaj ankaŭ la eksterlandaj amikoj. Ili admiris, kiom da Esperanto-materialoj kolektis nia muzeo dum dekjara agado. Ili aprezis la helpon de nia urbo, ĉar laŭ iliaj spertoj aliaj sendependaj muzeoj tian subtenon ne ricevas.



Fine de la vizito ni konatigis ilin kun historio de la Ottendorfer-domo. Ili konas la urbon Milwaukee, kien Ottendorfer foriris elmigrinte. Tiuloke vivas granda germana komunumo kaj multaj konstruaĵoj estas de eŭropa tipo kiel nia „Ruĝa biblioteko“.



Vojaĝante al hotelo ili sendis al ni mesaĝon el trajno, dirante, ke ilin plezurigis afabla akcepto kaj ke ili volas teni kontakton kun ni. Ni pensu, ĉu vojaĝi al Usono.

Matěj Nárožný

Brno, urbo de nia asocia kongreso

Brno estis fondita en 1243, kiam ĝi ricevis urbajn rajtojn. Ĝi situas inter la riveroj Svatka kaj Svitava.

En 1645 la urbon sieĝis svedoj, sed sensukcese, kaj tiel Brno savis Vienon, ĉar svedoj ne povis ĝin ataki, havante ne konkeritan urbon post la dorso. Tio firmigis la pozicion de Brno kiel ĉefurbon de Moravio. En 1805 apud Brno furiozis batalo de tri imperiestroj ĉe Aŭsterlico, ĉeĥe Slavkov, kiun majstre priskribis Leo Tolstoj en la romano *Milito kaj paco*.

Nun la urbo havas 400 mil loĝantojn kaj aliaj 100 mil homoj ĉiutage venas labori. En Brno havas sian sidejon la Konstitucia Tribunalo kaj la Supera Tribunalo.

La plej allogaj vidindaĵoj en Brno estas la burgo Špilberk, katedralo de sanktaj Petro kaj Paŭlo sur la monteto Petrov, vilao Tugendhadt, la digolago kaj proksime de ĝi zoologia ĝardeno kaj burgo Veverí. En la urbo estas pluraj muzeoj, Moravia Landa Muzeo, Teknika Muzeo, Mendel-muzeo kaj eble plej multe vizitata muzeo Anthropos kun figuro de mamuto, kopioj de prahomaj desegnaĵoj el la franca groto Lascaux kaj multaj pentraĵoj de Zdeněk Burian pri la praepoko.

Ĉe la kapucena preĝejo kaj ĉe la preĝejo de Sankta Jakobo estas vizitindaj ostejoj. En la urbo troviĝas pluraj aliaj preĝejoj, franciskana, dominikana, de sankta Tomaso k.a. La plej gravaj placoj estas la Moravia, la Legoma Foiro, La Dominikana kaj en la centro la placo de Libereco. Al ĝi dominas la kontraŭpesta kolono, sed nun pli allogas la atenton speciala moderna horloĝo en formo de

kuglo. La placo nomata Legoma Foiro estas iom dekliva, kutime plenplena de standoj de legomvendistoj, en ĝia centro staras fontano kun statuoj kaj dekstre videblas la turo de la malnova urbo-domo. En ĝia trairejo pendas de la plafono remburita krokodilo kaj sur la muro granda rado, kiun laŭ legendo el la 17-a jarcento dum unu tago kreis radfaristo en Lednice kaj sukcesis ĝin alruli al Brno antaŭ la fermo de urbaj pordegoj.

Proksime la placon de Komenio ĉirkaŭas la ruĝa preĝejo, Masaryk-universitato, Janáček-akademio kaj la kulturdomo *Besední dům*, kie en 1969 estis fondita Ĉeĥa Esperanto-Asocio. Nun ĝi estas sidejo de filharmonio de Brno.



En la urbo estas pluraj teatroj (de Janáček, Mahen, fratoj Mrštík, Reduta, por infanoj Radost kaj Polárka), kinejoj, galerioj.

En 2007 la loka Esperanto-klubo sukcesis kunlabore kun la magistrato eldoni flugfolion pri la urbaj vidindaĵoj (elŝutebla nun ĉe la kluba retejo): http://esperantobrna.cz/malnova/smer_esp.pdf.

-mm-

PŘEDBĚŽNÝ PROGRAM SJEZDU

ČTVRTEK 17.10.

- od 15 hod. příjezd účastníků, ubytování
18:30 – 19:30 večeře
20:00 – 24:00 20:00 – 21:00 O. A. Fischer *Příroda Brna a okolí*
21:00 – 22:00 Mil. Kolka *Zkouška KER UEA*,
22:00 – 24:00 *103. kongres UEA Lahti*, volná zábava, zpěv, babilado apod.

PÁTEK 18.10.

- 7:30 – 8:30 snídaně
9:00 – 16:00 Výlet do Slavkova
16:00 – 18:00 Mahenova knihovna (program i pro veřejnost)
Křest knihy M. Stuppniha *Vždy lze zůstat člověkem* (Home en senhomeco)
Výstava k 50. výročí svazu v knihovně
18:30- 19:30 večeře
20:00- 24:00 program
20:00-21:00 Mir. Malovec *Historie esp.hnutí*, Brno, film 1950
21:00-22:00 přednáška
22:00 – 24:00 volná zábava, zpěv, babilado apod.

SOBOTA 19.10.

- 7:30-8:30 snídaně
8:00-8:45 přednáška O. A. Fischer *Louis Braille kaj Hieronimo Lorm*
9:00 – 12:30 členská schůze
12:30-13:10 oběd
13:15-13:25 společné focení
13:30-14:30 přednáška Seán O'Rian
14:30-18:00 prohlídka Besedního domu a procházka městem
18:30-19:30 večeře
20:00-24:00 společenský večer, hudba, tanec, kulturní program, program mládeže

NEDĚLE 20.10.

- 7:30-8:30 snídaně
8:00-8:45 přednáška Jos. Vojáčka *Výuka esperanta – Instruado de Esperanto*
9:00-11:30 jednání
12:00-13:00 oběd

V případě zájmu možnost návštěvy blízké ZOO Brno-Bystrc v neděli po obědě nebo v pátek pro ty, kdo nepojedou na výlet – průvodce p. Fischer

Další program, jako např. návštěvu hvězdárny, připravujeme. Změna programu vyhrazena. Bližší info bude uveřejněno na www.esperanto.cz.

Během kongresu bude jako vždy libroservo.

Přihláška na sjezd ČES (Brno 17.-20.10.2019)

Přihlášku vyplňte a zašlete e-mailem na adresu vratislav.hirs@esperanto.cz nebo poštou na adresu pokladníka Ing. Vratislav Hirš, Ruprechtov 117, 683 04 Ruprechtov nebo úplně nejlépe - vyplňte elektronický formulář na adrese <http://esperanto.cz/aligxilo2019>

Doporučení: Po vyplňovacích polích se pohybujte klávesou TAB. Tak žádné políčko nepřehlédnete.

jméno a příjmení účastníka (příp. včetně titulů - tak bude na jmenovce účastníka)

adresa:

ulice

PSČ

a místo

e-mail

telefon

variabilní symbol platby – číslo průkazu člena ČES, popř. ČEJ či SKEF (pro ověření nárokovaného zvýhodnění), nečlenové napište 5 číslic, kde první **NE** bude „0“

Datum narození vyplní každý, kdo požaduje ubytování

Číslo pasu vyplní jen zahraniční účastník požadující ubytování

Označení u čtverečků křížkem znamená výběr. (nastavíte/zrušíte mezerníkem)
Zakroužkování (při ručním vyplňování) **okolo čtverečku ruší (chybný) výběr.**

Přihlašuji se na akci Českého esperantského svazu v Brně, objednávám a zavazuji se uhradit následující. (Přihláška je platná až po zaplacení.)

Základní účastnický poplatek	600 Kč	<input type="checkbox"/>
Zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES, ČEJ, SKEF přihlášené po 15.9.2019	400 Kč	<input type="checkbox"/>
Zvýhodněný účastnický poplatek pro členy ČES, ČEJ, SKEF kteří se přihlásili a zaplatili nejpozději 15.9.2019	300 Kč	<input type="checkbox"/>
Čestný člen ČES, nevidomý člen ČES vč. doprovodu, člen výboru ČES, člen volební komise, místní organizátor, správce Libroserva	0 Kč	<input type="checkbox"/>
Jako mládežník do 26 let uplatňuji slevu 50 % z účastnického poplatku (nárok na slevu prokáži při prezenci)	50 %	<input type="checkbox"/>

Adresa ubytování: Střední škola informatiky, poštovníctví a finančnictví, Čichnova 23
<https://mapy.cz/s/3urXP> nebo <https://mapy.cz/s/3urYk> Nástup je možný od 16:00 ve čtvrtek. Pokoje 2+3 lůžka se společnou koupelnou a WC. Vykližení pokojů v neděli do 10:00.

Objednávám **zvýhodněný kompletní balíček:**

3 noclehy a stravování od čtvrteční večeře do nedělního oběda	1530 Kč	<input type="checkbox"/>
3 noclehy a stravování od čtvrteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky)	630 Kč	<input type="checkbox"/>
pouze stravování od páteční večeře do nedělního oběda (pouze pro členy výboru a výborem určené pomocníky)	630 Kč	<input type="checkbox"/>
požaduji samostatný pokoj ke zvýhodněnému balíčku s noclehy	270 Kč	<input type="checkbox"/>

žádám o zajištění vegetariánské stravy	<input type="checkbox"/>
žádám o zajištění balíčku na cestu místo nedělního oběda	<input type="checkbox"/>

Objednávám **jen jednotlivé ubytovací a stravovací služby**:

Pozn.: Rozhodně nevyplňujte, pokud již máte objednaný zvýhodněný kompletní balíček.

večeře – čtvrtek	80 Kč	<input type="checkbox"/>
nocleh ze čtvrtku na pátek	320 Kč	<input type="checkbox"/>
požaduji samostatný pokoj	100 Kč	<input type="checkbox"/>

snídaně - pátek	60 Kč	<input type="checkbox"/>
oběd – pátek (bez zájezdu)	90 Kč	<input type="checkbox"/>
večeře – pátek	85 Kč	<input type="checkbox"/>
nocleh z pátku na sobotu	320 Kč	<input type="checkbox"/>
požaduji samostatný pokoj	100 Kč	<input type="checkbox"/>

snídaně - sobota	60 Kč	<input type="checkbox"/>
oběd - sobota	90 Kč	<input type="checkbox"/>
večeře - sobota	85 Kč	<input type="checkbox"/>
nocleh ze soboty na neděli	320 Kč	<input type="checkbox"/>
požaduji samostatný pokoj	100 Kč	<input type="checkbox"/>

snídaně - neděle	60 Kč	<input type="checkbox"/>
oběd - neděle	90 Kč	<input type="checkbox"/>

prosím ubytovat s: (vepište jméno osoby – platí, jen pokud je požadavek vzájemný)

Zájezd do Slavkova v pátek 9-16 hod.

vstupné plné (památník Mohyla míru a zámek ve Slavkově)	340 Kč	<input type="checkbox"/>
vstupné zvýhodněné - senioři a studenti	270 Kč	<input type="checkbox"/>
oběd (polévka, vepřo knedlo zelo, nápoj) nebo	150 Kč	<input type="checkbox"/>
oběd (polévka, kuřecí plátek s bramborem, nápoj)	150 Kč	<input type="checkbox"/>
storno sobotního oběda zaplaceného ve zvýhodněném balíčku	-85 Kč	<input type="checkbox"/>

členský příspěvek ČES na rok 2020	<input type="text"/>	Kč
případný dobrovolný příspěvek pro ČES	<input type="text"/>	Kč
příplatek za přihlášku a/či platbu po 30.9.2019	100 Kč	<input type="checkbox"/>
za platbu na místě (Přihlášky na místě jsou však bez záruky!)	100 Kč	<input type="checkbox"/>

Upřesnění pro případ společné platby:

Za mne platí částku viz „Zaplatím tedy celkem“ níže

Já platím za ještě i částku Kč

Zaplatím tedy celkem ----->	<input type="text"/> Kč
<p>Úhradu proveďte na účet ČES: Fio banka, číslo účtu 2800186228 / 2010 Jako variabilní symbol uveďte číslo svého průkazu člena či čísla, které jste na vyhrazené místo pro číslo průkazu člena (jako nečlen - právě jen pro tento účel) uvedl(a)!</p>	<p>(kontrolu či přepočet provede pokladník ČES, který přihlášku také obratem potvrdí - jediné však - na uvedenou emailovou adresu)</p>

V případě odhlášení se účastnický poplatek nevrací! Odhlášení po 30.9.2019 budeme řešit individuálně a poplatky zahrnou i již nezrušitelné služby.

V dne .2019
 podpis (pro přihlášky poštou)

POZVÁNKA

NA ČLENSKOU SCHŮZI ČESKÉHO ESPERANTSKÉHO SVAZU, z.s. (ČES),

která se koná v sále Střední školy informatiky, poštovníctví a finančnictví Brno, Čichnova 982/23

dne 19. 10. 2019 od 9 hodin.

Program:

Zahájení, přivítání hostů, prezentace, kontrola usnášeníschopnosti, volba orgánů členské schůze (3-5členného předsednictva, zapisovatele a ověřovatelů zápisu)

Zpráva o hospodaření ČES

Zpráva o činnosti ČES a jejich organizačních složek

Volby nového výboru pro funkční období 2019-2022

Diskuze ke zprávám o hospodaření a činnosti ČES

Různé

Usnesení

Závěr

V Bohutíně dne 1.6.2019

Mgr. Libuše Hýblová,
předsedkyně ČES, z.s.



Inaŭguro de ekspozicioj



Omaĝe al la 50-jariĝo de ĈEA la Esperanto-Muzeo en Svitavy la 14-an de septembro 2019 inaŭguros du novajn ekspoziciojn **50 jaroj de la renovigo de la tutŝtata esperantista organizo kaj Junulara Esperanto-movado**. La programo komenciĝos je la 10.30 horo. Aliĝilojn akceptas kaj informojn kompletigas ing. Libuše Dvořáková (leonarda.ch@seznam.cz)

Tranoktoj eblas en la proksima tranoktejo Bárta.

Ankaŭ en **Brno** estos instalita ekspozicio pri la asocia 50-jariĝo (en Mahenbiblioteko komence de oktobro).

Someraj Kursoj

En **Lančov** okazos du etapoj **14.7.2019 – 27.7.2019** kaj **28.7.2019 – 9.8.2019** kun renkontiĝo de ekstendaranoj **9.8.2019 – 11.8.2019** (<https://www.set-lancov.cz/>)

Somera Esperanto-Studado (SES) ĉi-jare okazos en **Nitra** (Slovakio) en la tagoj **12. 7. - 20. 7. 2019**, vidu ĉe <https://ses.ikso.net/2019/cs/>

INTER ĈEĤAJ LITERATURISTOJ

Okazis je la 15-a de aprilo, 2019.

Por la interesigantoj pri nuntempa poezio la nomo **Věra Ludíková** estas bone konata. Kelkfoje ni jam sciigis la legantaron, ke ŝi estas favoranto de Esperanto ĝistiomgrade, ke ŝi vicigis la lingvon jam antaŭ 20 jaroj en sian literaturan projekton „Sendu ĝin pluen“.



S-ro Miroslav Marek, estro de la „Muzeo de kuriozaĵoj“ en Pelhřimov, transdonas al s-ino Věra Ludíková atestilon pri rekorda libro en 56 lingvoj

Sendadi pluen, disvastigi en la tutan mondon sian mesaĝon pri humanisma konduto, pri interkomprenado, pri projekto de la naturo – ŝi komencis en la formo, kiu estas por ŝi plej kara – do per poezio. Oni ja povas supozi, ke multaj poetoj esprimas siajn ideojn kaj sentojn per beletra formo.

Ŝi ĉiujare publikigas ĉarman volumeton, en kiu la poemoj estas interpretitaj en diversaj nacilingvaj tradukoj. Ludíková engaĝigas por la projekto amikojn, siajn konatojn, kiuj esprimiĝas en siaj denaskaj lingvoj.

Oni povas diri, ke siasence ŝi kunigas naciojn en siaj poeziaĵoj. Ĉijara libreto havas la titolon **Je jaro. Estas prin-**

tempo, 1+55. La „enigmo“ estu klarigita: en la projekto estas uzitaj 55 diversaj naciaj lingvoj (neniu dufoje) – nur „1“ apudas ilin ĉiufoje – Esperanto! En la verkoj estas uzitaj ĉu poeziaĵoj de ĉeĥaj esperantistoj (ekz. de Ĉestmír Vidman), ĉu ŝiaj – en tradukoj de J. Mráz, M. Malovec, F. Patera, J. Werner. Nur en la ĉeĥa kaj Esperanto troviĝas la titolo kaj la mesaĝo kaj la postparolo (en la traduko de M. Malovec).



Kiel ĉiujare okazis publika legado de la verketo – en persona prezentado de (la menciitaj) diversaj nacioj (la esperantan prezentis mi, Margit Turková). La solenaĵo okazadas en la spacoj de la Nacia etnografia muzeo, Prago, nune en la historia biblioteko – en kiu estis fondita ĉeĥa esperantista komunumo!

El la supre menciitaj faktoj klariĝas, ke la poetino alproprigis al si la plej taŭgan manieron por sendi siajn mesaĝojn de kristana humanismo – la internacian lingvon Esperanto...





Vojtěch Merunka legis poemon en sia nova artefarita lingvo „mezislovanština“

Okazis je la 16-a de majo 2019

Ĉu tio estas hazardo, ĉu la „providenca destino“, ke en la praga kvartalo Malešice vivis (preskaŭ en unu strato) kvar por ni konataj verkistoj – esperantistoj: Jiří Karen, František Kožík, Josef Rumler, Čestmír Vidman...

Kaj maljunaj kaj junaj „patriotoj“ de la regiono kunigis siajn emojn por prezentadi la „famajn kunloĝantojn“ al la nuna loĝantaro de la kvartalo. Ke ties literaturaj trezoroj ne perdiĝu en profundaĵo de arkivoj, sed vivigu la kulturan etoson.

La afero de jubileo komenciĝis per la poeto Jiří Karen, la persono, kiu estis „la plej videbla“. Plej ofte oni vidis lin en la loka parko, ĉu sidanta, ĉu paŝanta – sed ĉiam kun ia libro en la manoj. Ne povis tion ne rimarki unu lerta 6-jarulo: „Sinjoro, kion vi ĉiam faras, promenante?“ – „Mi legas librojn“. – „Ah ja, vi bedaŭrulo“... Nun la parko havas oficialan nomon: „Parko de Jiří Karen“.

Okaze de tiu afero realiĝis publika prezento de verkoj de Jiří Karen en kulturaj institucioj de la Prago 10-kvartalo. Lian riĉan agadon en la esperanta kampo prezentis mi, kaj Věra Ludíková – redaktinto de J. K.-verkaro.

Pasis 2 jaroj, kaj alvenis tempo por alia jubileo-festo: 100-naskiĝ-jaro de “la plej granda“ ... ja ĝuste je la 16-a de majo 1909 naskiĝis František Kožík. Lin oni ne bezonas prezenti – tuta ĉeĥa nacio konas lin – inter ili ĉeĥaj esperantistoj. La kultur-funkciuloj plenumis sian ŝatatan devon kaj kunigis la favorantojn de la verkisto en la Malešice-biblioteko. Min ili favoris, ĉar ĉe la supre menciita Karen-evento mi atentigis ilin pri František Kožík – esperantisto. Do vere – la programo enhavis parton pri tiu ĉi lia agado, kiun plenigis plejparte mi.

Dank’ al M. Malovec, kiu plenamplekse elĉerpis la agadon de esperantistoj en la Radio-elsendado en Brno, mi povis informi la partoprenantojn pri la etapo, kiam en la elsendejoj Brno, Bratislava, Praha, Ostrava estis prezentita la ĉeĥa kulturo per la fama **Verda Stacio**, kiun „tiris“ ankaŭ František Kožík.



Por ni ĉiuj fariĝis la evento neforgesebla, ĉar inter ni estis la filino de F.K. – Alena Kožíková... Pri la vivo kaj verko de sia patro ŝi scias ĉion – krom la tradukaĵoj, per kiuj ja povas „fieri“ ni, esperantistoj. Ĝoja estis konscio, ke danke al Vondroušek, Karen, Malovec enmondiĝis la verkoj **Největší z pierotů** (*La plej eminenta inter Pierotoj*), **Světlo v temnotách** (*Lumo en tenebroj – pri Komenio*), k.a.

Kompreneble, ke mi ne preterpasis la novaĵojn – la operon „Sternenhoch“ kaj la esperantan vikipedion. Sinjorino Alena K. tuj notis tion en sian kajereton kun la vortoj: „Mi devas tion pli profunde ekkoni“. Tion ni, esperantistoj, certe kun ĝojo akceptas...

Majo, 2019

Margit Turková

La 13-a Mediteranea Esperanto-Semajno en "Les Issambres"

2.3. - 9.3.2019

Jam de pluraj jaroj sinsekve okazas la Mediteranea Esperanto-Semajno en agrabla ĉemara loko en *Les Issambres*, kie tiutempe floras mimozoj. Flavaj buletoj forte odorantaj karakterizas la francan Provencon. Ili estas tradiciaj simboloj de feliĉo kaj de bonaj rilatoj. Ĉi-jare en la belega feriejo *Vacanciel* kuniĝis 93 geesperantistoj el dek landoj. Eĉ el la plej malproksima Siberio venis du partoprenantinoj. Samtempe la hotelo gastigis grupon da biciklantoj.



Posttagmezan sabaton bonvenigis nin per aperitivo s-ro Silvain Ceccoto, la estro de la feriejo *Vacanciel*. Post la vespermanĝo la organizantino de la aranĝo Christine Graissaguel prezentis al ni la ĉi-jarajn kursgvidantojn. Poste sekvis interkoniĝo. Mi informis la ĉeestantojn pri la fervojista kaj hispana kongresoj, kiuj okazos ĉi-maje en Malago.

Tuj la sekvan tagon komenciĝis instruado de Esperanto en kvarnivelaj kursoj. Pri komencantoj okupiĝis Christine Graissaguel, progresantojn instruis Michel Dechy laŭ la libroj de Tinĉjo. Li

uzis ankaŭ "La bildstrioj kiel lernolibro", kajerojn kiujn li eldonis. Katerina Arbekova el *Novosibirsk* uzis ludmetodan instruadon kun multaj bildoj, proverboj kaj mallongaj rakontoj. La plej spertajn lernantojn instruis Emnuele Regano el Italio. Liaj filozofiaj prezentoj kaj debatoj pri diversaj temoj, estis pri-pensigaj kaj nesolveblaj. Temis ekzemple pri problemoj de etiko, justeco, perforto, vegetarismo kaj veganismo. Oni parolis pri genro kaj sporto, identeco de transgenro al transsekso. Okazis debato pri inkluziva lingvo ktp. Dum la matenaj kafo-paŭzoj, kiujn zorgeme pretigis Monique Prezioso kun sia amikino Simone Marlier, oni povis ne nur babili, trinki kafon aŭ teon, sed eblis ankaŭ saltadi trans la kordon kaj samtempe lerni la kanton «Dek boteloj pendas ĉe la mur'». Tion iniciatis Carmen Segarra. La partoprenantoj multe amuziĝis per tiu ludo. Laŭdezire ankaŭ eblis partopreni la programon de la hotelo.



Posttagmezoj estis dediĉitaj al ekskursoj kaj al agrablaj promenoj en la ĉirkaŭaĵo. Dum la tuta semajno regis agrabla suna kaj varma vetero. Du kuraĝulinoj eĉ banis sin en la maro. Iuj profitis liberan tempon por legi, komputili aŭ ludi kartojn.

Liba Gabalda

REMEMORE PRI MIROSLAV SMYČKA

Omaĝe al la 2-a datreveno de forpaso de [Miroslav Smyčka](#) EK La Ponto Písek kunorganizis du aranĝojn. La unuan kune kun liaj familianoj realigis 25. 4. en Prago en la tombejo Olšany (kun eta kultura programo kaj ĉampano) kaj sekve en la preĝejo de Maria Virgulino la Pacreĝino en Lhotka.



Rememoroj kun fotajoj kaj kantado kaj sonregistraĵoj estis ligitaj kun fino de la ekspozicio "Magdaleno ĉe la piedoj de Kristo", kadre de kiu la bofilo de M. Smyčka,opersolisto de Nacia Teatro Richard Haan kantis kelkajn Bibliajn kantojn de A. Dvořák.

Fine la filino Jolana, membrino de la teatro SEMAFOR, kantis dum orgen-akompano konatan kanton "[Steloj, adiaŭ nun](#)" en Esperanto-traduko, kiun la patro instruis al ŝi en infanaĝo.

Ĉeĥan Esperanto-Asocion reprezentis L. Chaloupková.



La duan aranĝon ĉeforganizis amiko de M. Smyčka Miloš Dědič, estro de la Klubo de geamikoj de la Sudbohemia Teatro en České Budějovice 30. 5. 2019. Estis legitaj leteroj de Pavla Dvořáková pri aktivecoj de M. Smyčka en Esperantujo kaj rememoroj de Petr Chrdle.



Esperantistojn persone reprezentis kaj rememoris Jan Kalný el la eksa EK La Progreso kaj Vladimír Türk el Netolice, kunlaborinto de M. Smyčka pri sonregistraĵoj. La videoregistraĵon el la programo vi povas [spekti ĉi-tie](#).

Pavla Dvořáková

Koncerto en Frýdek-Místek



Spektantoj en la Turo

La 23-an de majo 2019 realiĝis en Galerio Turo en Frýdek-Místek koncerto de Ivan Acher, Jana Věbrová kaj Vanda Šípová el la arioj de esperantlingva opero *Sternenhoch* kaj ankaŭ el aliaj spektakloj, por kiuj I. Acher preparis sian muzikon.



M. Malovec kun I. Acher diskutas pri esperantlingva originala poezio

Post la koncerto Miroslav Malovec prezentis sian prelegon pri Esperanto kaj tradukado en la kafejo-sukeraĵejo sub la Turo. La prelego estas elŝutebla ĉe: <http://esperantobrnno.cz/malnova/elsutu.html>



Kantistinoj Jana Věbrová kaj Vanda Šípová (Helga el la opero Sternenhoch)

La koncerton kaj prelegon filmis Pavol Kaščák el Verda Stacio. S-ro Acher esprimis opinion, ke muziko povas sproni la Esperanto-movadon, sed li preferas muzikigi originale verkitajn poeziajn tekstojn antaŭ tradukoj.



La artistoj kun siaj infanoj

La opero *Sternenhoch* estis ludata en Ostrava (3.6.) kaj denove aperos en Nacia Teatro en Prago en septembro 2019 (biletoj nun preskaŭ disvenditaj). Interparolon de Marek Eben kun Ivan Acher elsendis ČT (5.6. kaj 9.6.)

*Miroslav Malovec
fotoj L. Němec kaj P. Kaščák*

M. Malovec kaj L. Chaloupková dankas al J. Čejková, V. Koloničná kaj L. Němec, kiuj dediĉis al ili sian tempon por trarigardi la urbon.

Žárová u Losin

11.5.2019



Foto Jaroslav Liška

Dek personaj aŭtomobiloj alveturis al la kastela parko de Velké Losiny kaj de tie ili transportis 33 partoprenantojn de tradicia renkontiĝo de EK Šumperk al Žárová. Venis gastoj el Šumperk, Rejchartice, Bukovice, Bludov, Bohutín, Zábřeh, Olomouc, Prostějov, Červená Voda, Lanškroun, Žamberk, Česká Třebová, Svitavy, Písečná, Pardubice, Bavorov.

La unua halto estis ĉe ligna preĝejo de la jaro 1611. Tiu ĉi kultura memoraĵo, kiun plurfoje uzis ankaŭ filmistoj, estis eksterordinare malfermita por nia grupo. Nia programo interne estis dulingva, nome en Esperanto kun traduko en la moravian. La preĝejon riĉigis du kantoj en latino, kiujn kantis Alžběta Hloušková.

Poste ni transiris al loka gastejo, kie la mastrino kuiris por ni gulaŝon, kvankam ŝi devis malfermi je kvar horoj pli frue. Ankaŭ ĉi tie estis dulingva klarigo pri la malgranda vilaĝo. Granda surprizo por ni estis, ke ili preparis por ni esperantlingvan karton de trinkaĵoj.

Jam tradicie sekvis informoj de kluboj

kaj invitoj por iliaj aranĝoj. Fine venis granda tombolo kaj kantado kun akordeono.

Kvido Janík

MIGRAN EKSPOZICION GASTIGIS BRNO

La tutŝtata migra ekspozicio "[Ĉu Esperanto estas morta lingvo?](#)" dum la monato junio 2019 viziteblis en la koridoro ĉe la biblioteko de la Universitata areo en Brno-Bohunice, kiu fariĝis ekde 2010 jam la 38-a kunlaboranta institucio envice.



Danke al iniciatemo de Josef Vojáček la ekspoziciko en la urbo prezentiĝis jam la kvinan fojon. Daŭrigo okazos supozeble en la Urba Biblioteko en oktobro lige kun la ĈEA-Kongreso. Koran dankon al li kaj al M. Malovec pro la helpo dum instalado.



Pavla Dvořáková

Tutslovakia Esperanto-Renkontiĝo

Ĉi-jare la Tutslovakia Esperanto Renkontiĝo, ene de kiu efektiviĝis ankaŭ la kongreso de SKEF, okazis en Liptovský Hrádok de la 9-a ĝis la 12-a de majo. Ĝia temo estis „Esperanto subtenanto de multlingvismo kaj lingvo-protektanto“. Partoprenis ĝin krom slovakaj esperantistoj gastoj el Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Hungario, Italio kaj Pollando.



Johano Vajs prelegas pri Esperanto-sumoo

El la riĉa programo mi nomu almenaŭ la gravan prelegon de la prezidanto de EEU, irlanda diplomato momente aganta en Vieno, Seán Ó Riain, kiu parolis pri la danĝero de la superregado de la angla por tiel nomataj „malgrandaj“ lingvoj sur la ekzemplo de la irlanda kaj kimra lingvoj. Lia prelego estis registrita kaj ĝi estas rigardebla ĉe

<https://www.youtube.com/watch?v=sJM8RHcutoE>.

Grava estis ankaŭ la prelego de Jozefo Reinvarť pri la fono de la propono de en- vicigo de „La lingvo Esperanto kiel portanto de slovakaj kaj esperanta kulturo“ en la liston de nemateria kultura heredaĵo de Slovakio laŭ la modelo de similaj atingoj en Kroatio kaj Pollando.

Tria elstara programero, kiun mi volas emfazi, estis prezento de Granda Vortaro Slovaka-Esperanta fare de ĝia aŭtoro Július Hauser (rig. la paĝon 59).

En neformalaj interparoloj kun Petro Baláť kaj ĉiuj tri nomitaj diplomatoj Ó Riain, Reinvarť kaj Hauser mi invitis ilin al la kongreso de ĈEA en Brno kaj ĉiuj promesis sian partoprenon.



Prelego pri Kurisu Kei

Estis elektita nova komitato, kiu laboros en la konsisto de Peter Baláť (prezidanto), Jozefo Reivart (vicprezidanto), Mária Pilková (kasisto), Eva Poláťková (projektoj, prizorgado de monrimedoj), Pavol Petřík (redaktoro). Kiel revizianto estis elektita Magdalena Feifíĉová.

Krome okazis kunveno de la prepar-komitato de ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso, kiu havos lokon same en Liptovský Hrádok.

*Petro Chrdle,
fotoj: Peter Rybín*

Granda Vortaro Slovaka-Esperanta



Július Hauser, konata kontribuanto al la revuo *Monato*, eldonis *Velký slovensko-esperantský slovník*, 1196 paĝoj, formato 16,5x24 cm, prezo 54 eur (cca 1400 Kč) + sendokostoj. Pli ol 80 000 nestoj. Eldono proprakosta, 50 ekz. Interesatoj skribu al juhamas@gmail.com.



Foto Petr Rybín

Július Hauser kun sia vortaro en la Tutslovakia kongreso en Liptovský Hrádok

-mm-

Ovofritaĵo

19.5.2019

Jam tradicia aranĝo de la Esperanto-klubo en Ostrava-Vítkovice bonvenigis ne nur proprajn klubanojn, sed ankaŭ gastojn.



ESPERANTO KLUBO PROSTĚJOV

La 3-an de majo okazis en Olomouc en regionhistoria muzeo jarkunveno de loka Esperanto-klubo, en kiu inter 11 partoprenantoj gastis ankaŭ ĈEA-prezidantino kaj reprezentanto de la klubo de Šumperk.



Ekspozicio en la senato

Marde la 11-an de junio 2019 estis inaŭgurita ekspozicio pri Otokar Březina kaj tradukado de liaj poemoj en aliajn lingvojn.



La ekspozicion preparis Viktor Dvořák, kiu ankaŭ trovis 16 tradukojn de la poemo *Mia patrino* kaj eldonis ilin libroforme en 2013, kion en 2014 sekvis libro *Mistero de doloro* kun tradukoj de pluraj poemoj al 12 lingvoj.



Tiun fakton rimarkis ankaŭ la agentejo de rekordoj en Pelhřimov kaj honorigis s-anon Dvořák per diplomo. Transdonis Miroslav Marek, estro de la agentejo kaj muzeo de rekordoj.

La ekspozicio okazis sub aŭspicio de senatano RNDr. Miloš Vystrčil. Partoprenis ankaŭ reprezentantoj de Počátky (kie Březina naskiĝis) kaj Jaroměřice (kie li mortis). Jiří Höfer de la Muzeo de Otokar Březina parolis ne nur pri aktualeco de Březina, sed alportis ankaŭ lian mozaikan portreton. Magdalena Krejčová deklamis poemon *Moje matka* (Mia patrino) kaj leteron de Jakub Deml al Březina. Inter iliaj paroladoj violonis s-ro Petr Hudeček. Viktor Dvořák poste prezentis la unuopajn panelojn.

Antaŭ la inaŭguro ĉiĉeronino montris al nia grupo la Valdštejn-palacon, en kies ĉevalejo nun sidas la senato.



En granda salono ŝi unue priskribis biografion de Valdštejn, poste ni trairis plurajn ĉambrojn kaj koridorojn, kiujn kondukis nin al la ĉevalejo, en kies antaŭĉambro nun troviĝas la ekspozicio:

Otokar Březina – tradukoj de poemoj aŭ ĉu ni interkompreniĝos en EU?

M. Malovec, fotoj L. Chaloupková

Josef Kavka

1922 – 2019

La 15-an de junio 2019 forpasis kiel 97-jara D-ro **Josef Kavka**, kandidato de sciencoj, geologo-petrologo, honora membro de ĈEA, UEA kaj ISAE, multjara redaktoro de *Scienca Revuo kaj Geologio Internacia*, aŭtoro de multaj fakaj artikoloj esperantlingvaj kaj ĉeĥlingvaj.



J. Kavka estis ankaŭ fervora ĝardenisto

Li naskiĝis la 25-an de aprilo 1922 en Hořovice kaj jam de infanaĝo aŭdis Esperanton de sia patro. Sed vere li esperantistiĝis en 1948 kaj en 1949 gvidis rondeton de gelernantoj en Duchcov.

Li studis pedagogian kaj geologian-geografian fakultatojn de Karola Universitato en Prago, estas kandidato de sciencoj ĉe Ĥemia-teĥnologia Altlernejo.

Profesie li estis petrologo, profesoro en ministaj mezlernejoj en Duchcov, Prago kaj Kladno (li verkis lernolibron pri geologio por mezlernejoj), poste estro de speciala geologia esplorado en la ŝtata entrepreno Geindustria.

Li estas aŭtoro de preskaŭ tri centoj da artikoloj plejparte sciencnivelaj, sed ankaŭ popularsciencaj kaj prilingvaj kaj aparte pri Esperanta terminologio. Neni- am li forgesis ankaŭ en siaj nacilingve skribitaj verkoj aludi la rolon de Espe-

ranto por la koncerna esploro.

Inter 1961 kaj 1973 li plenumis la taskon de landa delegito de ISAE, en 1965 li fondis Geologian Sekcion de ISAE kaj la almanakon **Geologio Internacia**, kiun li redaktis ekde la 1-a (1967) ĝis la 8-a volumo (1990). La 9-a GI-volumo estas aperinta sub lia redakto, kiel faka SR-kajero fine de 2001. Dum la jaroj 1971 ĝis 1980 ĝenerala sekretario de ISAE, ekde 1978 ĝis 1987 li tre altnivele redaktis la organon de ISAE **Scienca Revuo** kiel ĉefredaktoro, kaj ekde 1988 kiel kunredaktoro.

En la jaro 1964 la faka publikaĵo de Karola Universitato en Prago „Acta Universitatis Carolinae (Geologica)” unuafoje en la historio aperigis scien- can tekston en Esperanto, *nome* la studon de d-ro Josef Kavka: "Al la difino, klasado kaj nomenklaturado de la fonolitecaj vulkanroj" (*K definici, rozdělení a názvosloví znělců*) kun resumoj en la ĉeĥa, germana kaj hungara.

En 1971 la eldonejo Kartografie eldonis esperantlingvan **Poŝatlaso de la mondo**, por kiu d-ro Josef Kavka esperantigis la mapojn kaj d-ro Tomáš Pumpr la tekstojn. Pri la geografia nomenklaturado en Esperanto ili aperigis ampleksan studon en *Scienca Revuo*, n-ro 1-2 en la jaro 1972.

En 1995 aperis lia verko **Ĉu leŭcito en Bohemio?**, kiun eldonis KAVA-PECH, same kiel en 1996 **Kontribue al PIV – Homonimoj en Esperanto**.

Konserviĝis [Son-intervjuo](#) kun d-ro Kavka en Ĉina Radio.



■ La 6-an de majo 2019 forpasis s-ino Olĝa Marčková, edzino de akademiano Stano Marček. Ŝi suferis dum 15 jaroj batalante kontraŭ kancero.

JUBILEANTOJ

DE APRILO, MAJO KAJ JUNIO 2019

Marie Blažková, Jablonec nad Nisou

Jaromír Čáň, Pardubice

Marie Čápová, Teplice

PaeDr. Marie Dadáková, Střítež nad Ludinou

Petr Jonáš, Litomyšl

PhDr. Marie Kaufmannová, Městec Králové

Miluška Krejčová, Ústí nad Labem

Josef Kubálek, Přerov

Ing. Martin Kumpošt, Hradec Králové

Ing. Jiří Novotný, Hynčice

Jan Řepa, Netolice

Ing. Renata Sedláková, Praha

Milan Souček, Třebíč

Karel Stulz, Karlovy Vary

Věra Štěpánová, Ústí nad Labem

Jiří Toman, Prostějov

Karel Válek, Frýdek-Místek

Ing. Čestmír Závodný, Frýdek-Místek

Al ĉiuj jubileantoj ni deziras ĉion plej bonan - sanon, kontentecon, vivoĝojon

Novaj ĉeĥaj libroj pri internaciaj lingvoj

Lada Hanzelíková – Radka Fránová

Alexander Sommer Batěk: neoglyfy
Eldonejo Pavel Mervart en Červený Kostelec, 2018, 215 p. + 32 aldono

Alexander Sommer-Batěk (1874-1944) estis grava esperantisto kaj inventisto de internacia skribo, neoglifoj. Plie pacifisto, kemiisto (kunaŭtoro de ĉeĥa kemia terminologio), universala persono. La ĉeĥlingva libro estas dediĉita al historio de internaciaj lingvoj kaj skriboj kaj al liaj neoglifoj speciale.

Arnošt Lamprecht

Ke kořenům jazyků (Al la radikoj de lingvoj). *En 2019 eldonis eldonejo HOST Brno, 192 p.*

Arnošt Lamprecht (1919-1985) estis grava ĉeĥa lingvisto, instruisto de Mirek Čejka (1929-2017), kiu kun li ofte kunlaboris. La libro konsistas el partoj paleobohemistiko, paleoslavistiko, ĝenerala lingvistiko kaj nostradika hipotezo kaj hindoevropistiko. La parto pri ĝenerala lingvistiko enhavas du artikolojn pri Esperanto (p. 111-126).

Yens Wahlberg

Stopařův průvodce po galaxii jazyků. Fantastická lingvistika od Tolkiena po Klingony. *Paseka 2019, 257 p.*

La libro okupiĝas pri artefaritaj lingvoj aperintaj en televidaj serioj pri kosmaj vojaĝoj (Star Trek k.s.), sed parolas ankaŭ pri solresol, volapük, esperanto kaj interlingua.

Jan Vladislav – Eeseje

Torst, Praha 2018, 1117 paĝoj

Sur la p. 814-815 pri Esperanto kaj ĝia persekutado en subĉapitro Malpermesitaj lingvoj.

Ivan Acher „En naĝejo“

Fama ĉeĥa intervjuisto Marek Eben en sia programo *Na plovárně* (En naĝejo) de Ĉeĥa Televido interjuis (5.6. kaj 9.6.2019) komponiston Ivan Acher pri lia muzika laboro kaj precipe pri la opero Sternenhoch kaj ĝia esperantlingva formo. Ivan Acher klarigis, ke li volis, ke la teksto sonu kiel la itala, sed ne estu katenita de tradiciaj italaj konvencioj, Esperanto donis bezonatan liberecon.

Periodikum Českého
esperantského svazu, z.s.
50. ročník

Redaktor: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

starto@esperanto.cz
http://www.esperanto.cz/starto

Předplatné v Česku
(bez členství ve svazu): 200 Kč

Členská evidence a změny adres:
p/a Vratislav Hirš, Ruprechtov 117,
683 04 Drnovice,
vratislav.hirs@esperanto.cz,
tel. 517 444 117

Uzávěrka příštího čísla: 15.8.2019

--

Organo de Ĉeĥa Esperanto-Asocio
50-a jarkolekto

Abonebla ĉe UEA, ĉe niaj perantoj
aŭ rekte ĉe nia Asocio

Abonprezo: 11 eŭroj, ekster
Eŭropo 13 eŭroj

(se aerpoŝte: + 3 eŭroj)

elektronika versio PDF 6 eŭroj

Redaktoro: Miroslav Malovec,
Bosonožská 15/10, 625 00 Brno,

Ĉeĥio, starto@esperanto.cz

http://www.esperanto.cz/starto

Presis: DTP centrum, Svitavy

Redakto-fermo de la sekva
numero: 15.8.2019

ISSN 1212-009X

Redakto-fermoj: 1.2.; 7.5.; 15.8.; 15.11.

KALENDARO 2019

2019-06-22 Renkontiĝo de eksaj tendaranoj en
Herbortice, m.svacek@seznam.cz

2019-07-14/27 Dua etapo SET Lančov

2019-07-28/08-09 Tria etapo SET Lančov

2019-08-09/11 Renkonto de eksaj tendaranoj

Info: let.lancov@seznam.cz

<https://www.set-lancov.cz/>

2019-09-14 Inaŭguro de ekspozicio en Svitavy

Info: dvor.libuse@seznam.cz

2019-09-22 110 jaroj de EK Pardubice kaj
datrevenoj de Dr. S. Schulhof (1864-1919)

Info: neh@esperanto-neh.eu

2019-10-11/13 Konferenco de ĉeĥaj fervojistoj

Info: annaabelovska@seznam.cz

2019-10-17/20 La 17-a Kongreso

de Ĉeĥa E-Asocio en Brno

Info: cea@esperanto.cz

2019-11-7/10 Aŭtuna seminario Bartošovice

Info: verdastacio@gmail.com

2019-11-30 Antaŭkristnaska renkontiĝo en

Písek, Info: pisek@esperanto.cz

2019-12-08 Marcipana Kristnasko en Svitavy

Info: svitavy@esperanto.cz

2019-12-28 Esperantista Silvestro en Ĉeská

Třebová, Info: kovar.lad@email.cz

Eksterlande

2019-07-6/15

La 55-aj Baltiaj E-Tagoj en Panevežys, Litovio

Info: litova.ea@mail.lt

2019-07-12/20 SES Nitra

<https://ses.ikso.net/2019/cs/>

2019-07-20/27

La 104-a Universala Kongreso
de Esperanto en Lahtio, Finnlando

Info: <https://uea.org/kongresoj>

2019-07-28/08-04

La 75-a TEJO-Kongreso
en Liptovský Hrádok, Slovakio

Info: <https://ijk2019.tejo.org>

2019-08-10/17 69a KELI-kongreso en

Révfülöp, Hungario

2019-08-24/31

La 86-a Itala E-Kongreso en Trieste

<https://kongreso2019.esperanto.it>

2019-09-20/22 Artaj Konfrontoj en Esperanto
en Poznań (PL)

Info: www.arkones.org



Usonaj lingvistoj en nia Esperanto-Muzeo



Lingva seminario en Skokovy



Esperantistoj en Žárová



Koncerto en la Turo de Frýdek-Místek



Tutslovaka Esperanto-kongreso en Liptovský Hrádok



EK Mladá Boleslav okazigis en ĝardeno de *Komunitní centrum Klementinka* lanĉon de la libreto *Vyprávěnky*